

ILEI proponas la Landan Asocion de BURUNDO por premio Hamdan de UNESCO

Ĉiun duan jaron UNESCO proponas premion Hamdan por stabloj, kiuj efike lertigas geinstruistojn. Tri stabloj povas ricevi parton de la premio. La nomo Hamdan estas nomo de la persono, araba princo, kiu finansas la premion.

En oktobro 2013 ILEI pripensis pri kandidatigo de la burunda asocio por tiu premio. Estas fakto, ke la esperantistoj en Burundo estas aparte altnivelaj, efikaj, sindonemaj, diligentaj, multnombraj. Ĉiuj tuj ekinstruas, kiam ili iom lernis nian lingvon. Mi instruis en Rumonge en 2011 kaj povis mem konstati la altan nivelon de 40 gestudentoj ; plie mi povis aŭdi, ke ili NENIAM krokodilas !

Pro tio mi verkis kandidatigan dokumenton de ILEI kaj rilatis kun la estraro de ANEB por obteni kandidatigon laŭ la postuloj de UNESCO. Ni sukcesis ĉion sendi antaŭ la limdato 31an de oktobro 2013. Nun ni havas konfirmon, ke la diversaj dokumentoj (en la franca lingvo) bone atingis la ĝustan oficejon en Parizo. Do la ĵurio nun ekscias pri la elstara laboro de ANEB kaj la valoro de ESPERANTO. Ĉu ANEB ricevos la premion ? Ni vidos. Ĉiumaniere kandidatigi valoras.

En novembro 2013 okazas la Ĝenerala Konferenco de UNESCO en Parizo. Tia grava kunveno okazas ĉiun duan jaron. ILEI tie havas 3 delegitojn. Tiuj niaj kolegoj renkontis la burundajn diplomatojn ĉe UNESCO kaj povis informi ilin pri la kandidatigo de ANEB !! Tiu kontakto povas esti tre valora, depende de la raporto de tiuj diplomatoj al sia registaro.

Mireille Grosjean
Prez. de ILEI